BIBLIOTHÈQUE LA CHAUX-DE-FONDS
Li SVI

Svisa Esperanto-Societo
Poŝtfako 779
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Tel.: (039) 26 74 07

Marto 1990

SVISA ESPERSANTO-SOCIETO
INFORMAS

## ĜENERALA KUNVENO

Dua ripeto de la kunvoko

Loko: Berno
Dato: Sabaton, la 17-an de marto 1990
Kunvenejo: Hotelo METROPOLE, Salono II, Zeughausgasse 26, 3011 Berno
Horaro: 09h00: Malfermo de la salono kaj instalado de la libro-servo
10h00: Kafumo kaj interkona babilado

**10h30: Malfermo de la Ĝenerala Kunveno**

Tagordo statuta

Prezidos Claude GACOND kaj protokolos Andy KÜNZLI.

a) Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno (Vd SER 1989-3 aprilo).
b) Raporto de la Centra Komitato ( Vd. SES informas, februaro kaj marto).
c) Financa raporto (Vd. SES informas, februaro kaj marto).
ĉ) Raporto de la kaskontrolantoj (Vd. SES informas, februaro).
d) Raporto de Ekzamena Komisiono (vd. SES informas, marto).
e) Elekto de membro de la Konflikto-Komisiono por anstataŭi la demisiinton Alfred WENGER. Kaŭzo de lia demisio: maljuniĝo.
f) ~~Buĝeto kaj kotizoj por la venonta jaro. (SES informas, marto).~~
ĝ) Diversaĵoj.

Noto: Ĉiu kunportu la raportojn, kiujn ni ne relegos.

**12h00 aŭ seeble pli frue: Fermo de la Ĝenerala Kunveno.**

**12h30: TAGMANĜO**

(Menuo vianda aŭ vegetarana je po SF 23.50. Manĝontoj sin anoncu je la alveno al la kasisto Ernst VON MÄY tuj pagante la koncernan monsumon).
Asparaga kremsupo - bovaĵo ĉasarta aŭ legomaro - terpoma kaĉo - salato verda.

## POSTTAGMEZA PROGRAMO

**14h00-14h45: Kiel funkcias VIDEOTEX kaj kiajn servojn ĝi povos alporti al esperanto, kun demonstracioj, fare de s-ro R. DICK, kiun esperantigos Angello MELLINI kaj Franz BRÜGGER.**

**15h00-15h45: Recitalo de NIKOLIN' el Belgio. Ŝi prezentos kantojn el sia tutmonda repertuaro, kun speciala surprizo: premiero el ŝia lasta kasedo: Lulkantoj.**

16h00: Adiaŭa teumo kaj babilado.

16h30: Fermo de la libroservo kaj de la standoj.

Espero: La prezidanto esperas, ke multaj SES-anoj ĉeestos la kunvenon kaj la tutcerte tre allogan posttagmezon. Invitu esperanto-komencantojn.

(Claude GACOND)

-oOo-

## FINANCA RAPORTO (aldonaĵo)

Publikigante la bilancon, ni faris eraron, kiun vi bonvolu korekti sur la 3-a paĝo de la februara numero de SES informas. En la marĝeno dekstre de la kolumno de la **aktivoj**, devus troviĝi la kolumno de la **pasivoj**. Vi bonvolu do aldoni la vorton **Pasivoj**, kaj laŭ-sekvajn sumojn: linio **Fonduso centjara jubileo de Esp: 4'098.-;** linio **Junulara vojaĝfonduso: 259.50;** linio **Transaj eroj aktivaj k. pasivaj: 455.-;** linio **min. pago el GEP 4'000.- (komputilo KCE): 22'602.35;** linio **27'602.35: ankaŭ 27'602.35;** linio **min. bankspez. 11.- (SVB): 19'525.75;** linio **19'525.75: ankaŭ 19'525.75.** En la financa raporto mem je la 10-a linio devus troviĝi ne 7'800.-, sed 4'098.- Ni pardonpetas pro tiu eraro.

## BUĜETO

**Enspezoj**

| | |
|---|---|
| Membrokotizoj: | 7'000.- |
| Abono al SER: | 300.- |
| Donacoj: | 1'200.- |
| Heredaĵo: | 20'000.- |
| Interezoj malnetaj | 2'000.- |
| Diversaĵoj: | 100.- |
| Sume: | 30'600 |

Finjara gajno: 12'000.

**Elspezoj**

| | |
|---|---|
| SER + SES informas | 6'000.- |
| UEA-kotizoj | 200.- |
| Propagando + varbado | |
| Argus: | 400.- |
| Perkorespondaj kursoj | 5'000.- |
| Eldonaĵoj | 4'000.- |
| CK-administrado | 2'000.- |
| Kunvenoj ĝen. k. reg. | 500.- |
| Bankspezoj, divers. | 500.- |
| Sume: | 18'600.- |

## RAPORTO DE LA CENTRA KOMITATO - daŭrigo

**Heredaĵo**

La buĝeto anoncas la ricevon de heredaĵo. Jam nun ni povas diri, ke montriĝis necese profitigi SES-n de tre intima kunlaboro kun KCE-GEP. Unueco estas forto: La senimpostigo de GEP profitu al SES. Sed SES transprenu siajn respondecojn. Tion inaŭguras la buĝeto 1990.

**Defendo de niaj atingaĵoj**

Pretiĝas raporto por defendi la statuson de esperanto ĉe Svisa Radio Internacia. SES alportu sian kunlaboron por dissendi la koncernan raporton al la membroj de la decidpovaj instancoj.

**Arkivaĵoj**

Ekde 1967 la arkivejo de SES estas CDELI mem. Estas necese tion rememorigi de tempo al tempo al la respondeculoj de la esperanto-societoj, por ke ne kreiĝu ekster CDELI arkivaj dokumentoj, kiuj riskas forgesiĝi. Ekde la komenco de 1990 la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds havas novan direktoron. La kunsido de la Federa Konsilio seebele okazos ĉe CDELI mem kun la celo renkontigi ĉiujn gvidantojn de la esperanto-societoj kun tiu nova respondeculo de CDELI.

**Regionaj labor-grupoj**

Ĝis nun SES ne sukcesis funkciigi nacilingvajn labor-grupojn: po unu por lingvo-regiono. Serĉante anstataŭantojn al la demisiintaj vicprezidantoj Malté GIOVANOLI kaj Dietrich WEIDMANN, kiuj respondecis pri la regionoj franc- kaj germanlingvaj, SES samtempe serĉos gvidantojn por la fondo de la dezirindaj labor-grupoj. Tio estos unu el la ĉefaj zorgoj de la Centra Komitato. Ambaŭ demisiis pro troa profesia okupiteco.

**Nuna konsisto de la Centra Komitato**

Okaze de ĉiu kunsido la Centra Komitato riĉiĝis je nova membro. La 13-an de januaro 1990 Nicole MARGOT estis alelektita. Ŝi okupiĝos pri la organizo de la regiona semajnfino en Romandio. Jen la nuna dispartigo de la funkcioj en la Centra Komitato: Prezidanto: Claude GACOND, La Chaux-de-Fonds; Vicprezidanto: Fritz LIECHTI, Zürich; Ĝenerala sekretario: Andy KÜNZLI, Kiens; Kasisto: Ernst VON MÄY, Oberuzwil; Vicprezidantoj kun speciala funkcio: itallingva: d-ro Tazio CARLEVARO, Bellinzona; junlaro: Ueli HAENNI, Bern. Ceteraj membroj: Mireille GROSJEAN-ROBERT, Les Brenets, prezidantino de KCE kaj GEP, Nicole MARGOT, Lausanne, Fritz WASSMANN, Wohlen kaj Dietrich WEIDMANN, Zürich, rilatoj kun UEA. Por la kunsido okaze de la UK en Kubo lin anstataŭos Andy KÜNZLI.

-oOo-

Aldonaj dokumentoj: Esperanto por mondcivitanoj, Dietrich Weidmann.